# EKO 2025

**Tago de Lingvo kaj Paco**


EKO 2025-37, Septembro 14  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## Eŭropa Tago de Lingvoj iĝas semajno de Lingvoj kaj Paco

De 2001 la Konsilio de Eŭropo, en kiu membras 46 ŝtatoj kun ĉ. 700 milionoj da loĝantoj, okazigas la Eŭropan Tagon de Lingvoj (ETL) ĉiun 26-an de septembro. Ĝi celas instigi al malkovro de pliaj lingvoj, ĉar lingva diverseco estas rigardata kiel ilo por atingi pli grandan interkulturan komprenon kaj kerna elemento de la kultura heredaĵo de la kontinento.

## Nova ses-persona estraro de TEJO

La 1-an de septembro 2025 ekoficis la novelektita estraro de TEJO kun Ana Ribeiro kiel la prezidanto de TEJO. Jen ni prezentas la teamon, danke al *La Ondo de Esperanto* pro la informoj.




## Multlingveco en UN esplorata

La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, en kunlaboro kun La Frankofonio (la organizo de francparolantaj landoj), kunvenigos specialan raportan kunsidon kun partopreno de stabanoj el la Oficejo de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo (OPGA) por priraporti iniciatojn rilate multlingvismon dum la 79-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN (2024-2026).

La Prezidanto de la sesio, Lia Ekscelenco Philemon Yang, fiksis kiel ŝlosilan prioritaton la antaŭenigon de “multlingvismo kaj multkulturismo, la fundamentoj de kultura diverseco spegulantaj la riĉecon de la popoloj kaj nacioj de la mondo.” En tiu ĉi speciala raporta kunsido, la laborteamo de OPGA pri multlingvismo informos pri la konsiderinda laboro de OPGA por realigi tiun celon pere de specifaj iniciatoj por centrigi multlingvismon. Sekvos rimarkigoj de la Konstanta Observanto por la Internacia Organizo de *La Francophonie*, Lia Ekscelenco s-ro Michel Xavier Biang.

Oni faros sian eblon liveri interpretadon en la ses lingvojn de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa) – sed bedaŭrinde ankoraŭ ne Esperanto. Tamen, esperantistoj havos la unuajn kaj lastajn vortojn: la prezidanto de la Komitato de NROj, prof. Francis Hult, enkondukos la temon, kaj mi donos finajn rimarkojn.

Multaj esperantistoj revas pri UN kiu uzu Esperanton. Bedaŭrinde unue necesas konvinki la diplomatojn, ke lingva egaleco estu prioritato de UN. UEA laboras por tio

Humphrey Tonkin

## La lego-lukto pluiras

La 95-a Sumoo komenciĝos la 14-an de septembro per du semajnoj. Mi atendas vian aliĝon. Dum tiuj du semajnoj vi legos esperanto-libron ĉiun tagon po unu aŭ kelkaj paĝoj, kiujn vi mem decidos. Vi legos kun esperantistoj en la mondo, do vi havos tie multajn amikojn. Por partopreni, donu al mi vian Sumoo-nomon, vian veran nomon, viajn urbon kaj landon, la titolon, verkiston kaj eldonejon de via legota libro, kaj kvanton da paĝo(j), kiun vi legos ĉiun tagon. Nia retejo: http://www.esperanto-sumoo.pl/

HORI Jasuo (Japanio)

## Ankoraŭ unu elstara virino en nia movado

Long-tempa esperantistino, Renata, konservas kontaktojn kun esperantistoj ĉe UN. Ŝi lernis Esperanton antaŭ dudek-kelk jaroj en Varsovio. Ŝi laboras por UNO dum preskaŭ 20 jaroj kaj specialiĝas pri Familioj Ĉirkaŭ la Mondo. Sur la foto ŝi aperas kun la siatempa elstara prezidanto de UEA, Humphrey. Tonkin, kiu oficisis de 1974 ĝis 1980.

***SMG:*** Bedaŭrinde, mia karnivora komputilo formanĝis la bildon.

## Donacoj por la Ondo

*La Ondo de Esperanto* (gazeto kaj novaĵretejo) ricevis en la abonjaro 2025 mondonacojn de ok patronoj kaj 23 amikoj. *La Ondo* dankas pro la subteno ĉiujn donacintojn, sen kiuj aperus nek la gazeto, nek la retejo. Vidu la liston de la donacintoj ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/ondo-147/

*SMG:* Mi varme rekomendas donacadon ankaŭ en 2026. La *Ondo* liveras koncizajn, trafajn tekstojn, ĉiam kun ligo al la pli plena artikolo en ilia retejo. Tial la EKO-komunikoj regule prezentas iliajn tekstojn.Temas pri komunika efikeco.

## Bulteno de UEA ĉe UN

**Numero 78 – septembro – oktobro 2025**

- Kongresanoj notis la disvastiĝon de Esperanto kaj ĝiajn teknologiajn implicojn.
- UEA elektis novajn prezidanton kaj estraron.

- La Kanada Ambasadoro, Prezidanto de EKOSOK, salutis la Usonan-Kanadan Esperanto-Kongreson.
- Parolantoj de Esperanto anoncis duoblan observon: Paco kaj Lingvo.

## Samarkandaj Tagoj

La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando. La evento celas refokusigi nian rigardon je alloga belo, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo. Tradicie, estas invitataj kontribui ĉiuj, por kiuj Samarkando estas pli ol nura urbo. Por kiuj ĝi estas vivanta memoro, emociplena historio, signifa malkovro, amdeklaro, rendevuejo kaj eĉ sorto. Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estante tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ sonĝoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.

Ĉiujare venas la Tago, kiam ni esperas, ke vi transformos viajn pensojn kaj sentojn en ion kreivan por el la fundo de via animo esprimi – naskitajn de via koro kaj enstampiĝintajn en via menso – rememorojn pri tiu ĉi speciala loko. VIA voĉo gravas! Bonvolu sendi viajn reeĥojn, gratulmesaĝojn kaj alispecajn tiutemajn kontribuojn ĝis la 1-a de oktobro 2025 al imps86@yahoo.com,

La plej interesaj kontribuaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetaro kaj en la venontaj eldonoj de “Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana”. ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Partnero de la projekto: Samarkanda Internacia Teknologia Universitato (SIUT).
https://siut.uz/en/press-center-en/news-en/1373-samarkand

Anatolij Ionesov, fondinto kaj prizorganto de la Enciklopedia projekto “Samarkandiana”
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando, Uzbekio

## Koutny pri Szerdahelyi

Ilona KOUTNY tre longe lekciadis pri Esperanto en la ekstermovada edkusistemo, en supera edukado en Hungario kaj en Pollando. Nun mi volas rekomendi universitatan libron, kiu enhavas interlingvistikajn studojn, artikolojn de SZERDAHELYI István. La artikolojn elektis, prilaboris kaj enkondukis KOUTNY Ilona, ĝi aperis en la urbo Poznano, en la jaro 2024. Jen la titoloj de kelkaj artikoloj de Szerdahelyi, en la libro:

- Vorto kaj vortelemento en Esperanto
- La artikolo
- Signo, sifignifo, signifo-integrado
- Principoj de esperanta etimologio (Enkonduka skizo)
- Instruado de Esperanto

## Prezento de la libro TRADUKU!

En preskau ĉiu numero de *La Brita Esperantisto i*nter 1991 kaj 1999 troviĝis anglalingva teksteto kun invito ĝin esperantigi. Tradukemaj legantoj sendis al William Auld siajn solvojn, kaj en la tuj posta numero la redaktoro prikomentis apartajn vortojn kaj esprimojn, aljuĝis premietojn kaj aperigis elektitan tradukon. Esperanto-Asocio de Britio reaperigis ĉiujn 56 tekstojn libroforme jam en du antaŭaj eldonoj. Jen, en brilaj novaj

vestaĵoj, la tria eldono! Kiel la aliaj ĝi enhavas la tekstojn, kiuj aperis en la rubriko, kun la komentoj de William Auld kaj la elektitaj tradukoj, plus indekson.

Fonto: TERanido, revuo el Busan, Koreio

## Glaĉeroj kuriere

Glaĉeroj fandiĝas je maltrankviliga rapideco. Tio tute ne estas bona novaĵo por nia planedo. La alfluo de akvo el fandiĝantaj glaĉeroj perturbas la akvo-ciklon kaj altigas la marnivelon, minacante marbordajn areojn. La Internacia Jaro de Konservado de Glaĉeroj, deklarita de Unuiĝintaj Nacioj por 2025, estas ŝanco pripensi la konsekvencojn de ĉi tiu fenomeno.
“Malaperantaj glaĉeroj” estas la ĉefa temo de la unua ĉi-jara eldono de “Unesko-Kuriero”, aperinta en la retejo de Unesko. Konatiĝu kun ĉi tiu Kuriero ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/unesko-42/, senpage elŝutu kaj legu ĝin.

***SMG:*** La Kuriero estas ankaŭ elŝutebla el la retejo de UEA sub la rubriko ‘Revuoj’. Tio gvidas al la retejo de la Kuriero, do ili vidas, ke oni elŝutas la Esperanto-version!

## Grava kaj brava elpaŝo de TEJO

Kadre de la 81-a IJK (Indonezio, aŭgusto 2025) estis lanĉita alvoko, subskribita, interalie, de la itala, kataluna kaj pollanda Esperanto-junularoj, kun kondamno de la agoj de la Israela registaro en Palestino. Legu ĝin en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/israelo-6/

***SMG:*** Iuj ĵetos la manojn aeren, kriante: “Esperantistoj ne eniru politikajn diskutojn!” Mi kaj aliaj opinias male, ke temas pri bazaj homaj rajtoj. La palestinanoj havas la homan rajton ne esti buĉataj.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.